

WEN BULTENO

WHITE

MAYO-JUNIO
1965



JEN-Bulteno Organo de la Junularo Esperantista de Nord-Ameriko
Majo/Junio, 1965

Sendu kotizojn al: Stanley F. Cohen, 16 Long Avenue,
(\$1.00 jare) Allston, Massachusetts 02134

Sendu materialon por la JEN-Bulteno portempe al:
Humphrey Tonkin, 7 Linnaean St., Apt. 6, Cambridge,
Massachusetts, 02138

Ĉi tiun numeron redaktis: Humphrey Tonkin kaj Julie Crandall
Tajpis: Julie Crandall; Kovrilon desegnis: Lynne White

Estraro de JEN:

Stanley F. Cohen Kasisto
Ann Bodine Sekretario
Humphrey Tonkin Komisiito pri Eksterlandaj Aferoj
Richard P. Kollin
Jonathan R. Pool
Robert Davis

Reprezentantoj al JEN:

Arthur Morse Okcidenta Massachusetts
Naomi Sabghir Universitato de Maryland
James Craighead Long Beach Polytechnical H.S.,
Kalifornio
Pat Spaeth San Diego
Nelly Perez Yip Portoriko
Fred Shell Universitato de Kalifornio, Berkeley
D-ro R. Ring Muhlenberg College, Allentown,
Pennsylvania

JEN petas ke ĉiu alia junulara Esperanto-grupo sur loka aŭ lerneja
nivelo elektu unu el siaj membroj kiel oficialan reprezentanton
al JEN. Sendu la nomon de la reprezentanto al la Sekretario.
Ĉiujn ĝeneralajn komunikojn oni sendu al la Sekretario --
F-ino Ann Bodine, Sage Hall, Cornell University, Ithaca, N.Y. 14850.

ĈEFARTIKOLOJ

JEN, kiel nia legantaro bone scias, estas malgranda organizo. Ĝi ekzistas dank' al la sindonemo kaj la kunlaboro de ĝia membraro, kaj la ĝenerala bonvolemo de la usona esperantistaro. Ĝia sukceso kiel organizo dependas eksterordinare de ĝia membraro, pro tio ke ĝi ne estas institucio sed malgranda kooperativo. Institucioj, la fundamentaĵoj de la homa socio, daŭras de generacio al generacio, firmaj insuloj en la fluso kaj refluso de la homaj popoloj. Kooperativoj, malgrandaj unuigoj, estas tamen produktoj de precize tiuj flusoj kaj reflusoj: ili dependas senpere de la homoj kiuj konsistigas ilin.

Nun venis denove la tempo por montri ke ni estas aktiva, kunlaborema kooperativo. En kelkaj rilatoj estas bedaŭrinde ke necesas elekti estraron, ĉar la tuta ideo de "estroj", de homoj kiuj havas specialajn respondecojn, kiuj devas fari la unuajn paŝojn, kiuj devas iniciati - tiu tuta ideo estas fremda al la ideo de kooperativo, de grupo de homoj kiuj kuniĝis pro simileco de interesoj. Sed elekti estraron necesas. Ĉiu ano de JEN havas respondecon elekti, uzi sian rajton por la bono de nia komuna agado.

Plenigu tuj vian balotilon kaj ensendu ĝin. Vi ne simple estas ano de JEN: vi estas JEN!

LA JEN-KANTARO, per la sekcio de ok paĝoj kiu troviĝas en la mezo de ĉi tiu Bulteno, estas nun kompleta. Elprenu ĉi tiujn ok paĝojn, kunigu ilin kun la kvar paĝoj kiuj aperis en la marta-aprila Bulteno kaj -- ekkantu! Pliaj ekzempleroj de la Kantaro, kunpinglitaĵ kaj pretaj por utiligo, estas haveblaj de Stanley Cohen, 16 Long Avenue, Allston, Mass. 02134, je kosto de po 10 cendoj (inkuzive afrankon). Tuj mendu aron por via klubo aŭ por via propra uzo.

Ni kaptas la okazon aparte danki al la redakcio de Kial Ne?, al S-ro Harry Holmes, al Humphrey Tonkin kaj al aliaj kiuj tradukis kantojn - kelkaj speciale tradukitaĵ por ĉi tiu kantaro kaj ne troveblaj aliloke en Esperantaj versioj.

#

JEN KONGRESO - 1965

Oratora konkurso, ekskurso tra Portland (La Urbo de Rozoj), teatraĵo, kaj bongusta bankedo atendas vin ĉe la 3-a kongreso de JEN! La Esperanto-Societo de Portland, Oregon gastigos JEN kaj ELNA en la 13-a nacia kongreso de Esperanto, okazonta la 22-an ĝis la 25-a de julio, 1965.


Favoraj kotizoj jam estas aranĝitaj por JENanoj ĉe la kongreso! Anstataŭ \$10.00, vi pagos nur \$5.00. Kaj eĉ la hotelo proponas siajn ĉambrojn kun rabato por JENanoj je \$3.50 nokte kun po kvar personoj en ĉambro.* La JEN-grupo ĉe Portland State College ankaŭ planas specialajn eventojn por JENanoj, siaj propraj gastoj dum la kongreso.

Ni urĝe petas vian ĉeeston de nia kongreso, kaj ni promesas, ke vi memoros ĝin ĉiame! "Okcidentenvojaĝu, junulo!" skribis Horace Greeley; kaj ni ripetas: "Okcidentenvojaĝu, junulo!"

Tom Davidson,
Portland State College

*Sendu kotizojn al S-ino Carol Belles, 6011 S. E., Gladstone St.,
Portland, Oregon 97206.

JUNA ESPERANTIS



Varma marol

Vastaj sunoriĉaj strandoj!

Internacia gejunula medio!

Varia kultura programo!

Prelegoj kaj diskutoj en Esperanto

pri interesa temaro

Ĉiuvespera dancado!

Speciala vespero pri Esperanto!

Karnavala festo de Neptuno!

Ĉion ci vi trovos en **PRIMORSKO** ĉe la Nigra Maro
inter la **20-A KAJ 31-A DE JULIO 1965** en la

DUA INTERNACIA SEMINARIO KAJ FERIOSEMAJNO,

AL KIU AFABLE INVITAS VIN BULGARA ESPERANTO-JUNULARO

La temo. Donante kontribuon al la internacia kampanjo "1965 — JARO DE INTERNACIA KUNLABORADO", ni fiksas tiun sloganon, kiel ĉefan temon de nia seminario. Prelegos eminentaj bulgaraj esperantistoj kaj fakuloj. La seminaria programo ampleksos 3—4 posttagmezojn de la dusemajna restado en Primorsko, dum la ceteraj tagoj estos rezervitaj je sportaj, belartaj k. a. aranĝoj, ekskursoj kaj simpla feriumado.

La kotizo, kiu inkluzivas plenan pensionumon kun partopreno en ĉiuj aranĝoj de la seminario-feriosemajno, estas 2,50 Dol. potage, se oni loĝas en tendoj, kaj 3,50 Dol. — en komfortaj bangaloj. Eblas ankaŭ malplilonga aŭ plilonga restado en la tendaro ĉiam laŭ la sama taga kotizo. La kotizoj estas sendandaj al **konto № 46018** — Bulgara nacia banko, Sofio, kun aparta indiko: „por Esperantista Seminario“.

Kiel aliĝi. Por aliĝi sendu simplan aliĝilon (laŭ aldonita modelo) al **Bulgara Esperanto-Junularo, p. k. 587, SOFIA.** Lasta limdato por aliĝo — 30. VI. 1965, sed pli frua anonciĝo konsilinda. Ĉiu bulgara konsulejo donas turisman vizon por eniro en la landon senprokraste kaj sen iu ajn formalajo.

(daŭrigo sur p. 40)

ESPERANTISTA KALENDARO, SOMERO 1965

Steleto (*) indikas junularajn aranĝojn

- 11-17 julio Eŭropa Esperanto-Konferenco, Vieno.
- *20-31 julio 2-a Internacia Seminario de la Bulgara Esperanto-Junularo, Primorsko. Temo: "La Jaro de Internacia Kunlaboro" (vidu apartan anoncon en ĉi tiu numero).
- 22-25 julio 13-a Kongreso de ELNA, 3-a Kongreso de JEN, Portland, Oregon (vidu apartan anoncon en ĉi tiu numero).
- 24-31 julio 18-a Kongreso de la Kristana Esperantista Ligo Internacia, Boldern, Svislando.
- *25-31 julio Internacia Junulkonferenco de la Fondaĵo Anne Frank, Amsterdam. Temo: "Komunikado" (vidu la martan-aprilon n-ron de la JEN-Bulteno)
- 25 julio-8 aŭgusto Internaciaj Turismaj kaj Kulturaj Ferioj, Kastelo Grésillon, Baugé, Francio.
- 31 julio-7 aŭgusto 50-a Universala Kongreso de Esperanto, Tokio.
- 31-julio-7 aŭgusto 38-a Kongreso de la Sennacieca Asocio Tutmonda, Karlsruhe, Germanio.
- *8-15 aŭgusto 21-a Internacia Junulara Kongreso de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, Kioto, Japanio (vidu la martan-aprilan n-ron de la JEN-Bulteno)
- 8-29 aŭgusto Kulturaj Esperantistaj Semajnoj, Kastelo Grésillon, Baugé, Francio.
- 13-20 aŭgusto 2-a Internacia Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto estas Instruata, Bishops Stortford, Anglujo.

*6-10 septembro Seminario de TEJO pri lingvaj problemoj en internaciaj junularaj rilatoj (nur por reprezentantoj de internaciaj junularaj organizoj).

24-26 septembro Nederlanda Esperanto-Kongreso, Amersfoort.

17-23 oktobro 19-a Brazila Kongreso de Esperanto, Rio de Janeiro. (Vidu apartan anoncon en ĉi tiu numero)

/Por pliaj detaloj pri la supre menciitaj internaciaj aranĝoj, skribu al la estrarano de JEN pri eksterlandaj aferoj, Humphrey Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass., USA, 02838/

#

TUDEF

La jena fantaziaĵo lastatempe atingis la manojn de membro de la opozicia sekso - nome nia sekretariino ANN BODINE. Aperigi ĝin nunmomente ŝajnas aparte taŭga ĉar precize nun TUDEF fervore batalas kontraŭ nekutime forta atako en la formo de geedziĝoj ĉiufrente! Tiurilate ni etendas niajn bondezirojn al LOIS SHAPIRO kaj GENE CALVERT, kiuj geedziĝis en aprilo en Novjorko, kaj al PHYLLIS ADORNATO kaj JOEL SILVERMAN, kiuj same faris, ankaŭ en aprilo, ankaŭ en Novjorko. Parenteze, la redaktoro, kiu estas bone informita pri tiaj aferoj, atentigas ke eĉ unu el la fondintoj de Tudef pasintjare tute milde kaj sen troa protesto eksigis sin per edziĝo al ĉarma hungarino. Sed unu averto: se absolute vi, fraŭloj, devas sekvi la ekzemplon de Gene kaj Joel, sekvu ĝin centprocente kaj edziĝu al - JEN-anino!

La baza statuto de T.U.D.E.F.

1. Tutmonda unuiĝo de eternaj fraŭloj estas organizaĵo de fraŭloj kunigintaj pro la sincera intenco konservi la fraŭlecon ĝismorte.
2. Kiel patronon de la unuiĝo oni proklamas la sanktan apostolon

(daŭrigo sur p. 31)

ALVOKO AL LA GEAMIKOJ DE LA JUNULARO

Malfermita Letero al ĉiuj plenkreskaj esperantistoj

Karaj kaj estimataj Gesamideanoj,

Sendube vi lastatempe ofte renkontis en la Esperanta gazetaraj raportoj pri la aktiveco de TEJO kaj de ĝiaj 19 Landaj Sekcioj kaj tial scias, ke la junulara sekcio de UEA ne kontentigis per la sukcesaj rezultoj de la Jaro de la Junularo 1963, sed ke ĝi daŭre plivastigas sian agadon sur multaj kampoj. Energie ĝi partoprenas en la kampanjo okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro, ekprenis intensajn kontaktojn al multaj gravaj internaciaj junularaj organizaĵoj, mem vigle preparas NEO-seminarion pri lingvaj problemoj kaj komencis en la kadro de novaj komisionoj agadon sur la kampoj ekstereŭropa, afrika, lerneja ktp. Entute ŝajnas evidente, ke neniam antaŭe la junulara Esperanto-movado travivis tiel favoran evoluon aŭ troviĝis en tiel promesplena situacio kiel ĝuste nuntempe.

Sed...preskaŭ ĉiupaŝe ni dolore konscias, ke io grava malhelpas eĉ pli impetan agadon - devigas nin ofte limigi la aktivecon tie, kie ĝi nepre necesus - entute multfoje bremsas la laboron de TEJO... Tiu ĉi granda obstaklo estas (tion vi verŝajne jam divenis) la financa nekapableco - problemoj, kiu per atentigoj, ke temas pri ĝenerala karakterizaĵo de la movado, tute ne perdas sian eksterordinaran tiklecon kaj ja antaŭ ĉio posedas aktualecon por la junularo esperantista, kiu laŭ ĉies opinio estas "nia espero pri la estonteco". Nur kiam la financa stato de TEJO plistabiliĝis, la estraro de TEJO kaj ĉiuj ĝiaj sindonemaj kunlaborantoj povos realigi multajn planojn, grandiozajn projektojn aŭ bonajn ideojn, kiuj momente tre bedaŭrinde devas kuŝi en tirkestoj kaj tie minacas polvokovriĝi - simple pro manko de mono!

Do, se vi vere fidus, ke la junularo estas "nia espero", pruvu tion, ni tre petas, per konkreta helpo, ĉar sincere dirite tiun ĉi TEJO plej urĝe bezonas por venki sian financon krizon. Ne pensu, ke ni "almozpetas", sed konsciu, ke finfine de sukcesa

a

(daŭrigo sur p. 36)

FESTA KONGRESO OKAZOS EN BRAZILIO

En la kuranta jaro Rio de Janeiro celebras kun brilaj festoj sian 4-an Jarcenton. La Registaro de Stato Guanabara invitis Brazilan Esperanto-Ligon okazigi kongreson en la kadro de la memorigaj ceremonioj kaj tial la 19-a Brazila Kongreso de Esperanto realiĝos en ĉi tiu urbo de la 17-a ĝis la 23-a de Oktobro 1965.

Kvankam temas pri Landa Kongreso, la brazilaj esperantistoj tre ĝojos kalkuli je la ĉeesto de multaj alilandanoj, precipe el Norda, Centra kaj Suda Amerikoj. Tia feliĉa partopreno donos al la Kongreso internacian koloron, kiu sendube multe efikos al la progreso de nia afero en ĉi tiu kontinento.

Inter multaj allogaj eroj de la programo ni mencias:

kunvenon de la Delegitoj de U.E.A. por studi la plej bonajn rimedojn intensigi ilian agadon;
diskuton pri la konveno kaj ebleco organizi Universalan Kongreson en Rio de Janeiro post 3-4 jaroj;
serion de Kulturaj Prelegoj (sciencia, teknika kaj artaj).

Ni varme esperas vian grandvaloran kunlaboron inkluzive per la diskonigo de nia Kongreso.

Kun kora saluto ni anticipas nian varman dankon.

D-ro Carlos Domingues
Prezidanto, Brazila Esperanto-Ligo

LINGVO KAJ EKSPORTO

El artikolo en "Elseviers Weekblad" de la 14-a de novembro 1964, pri la nederlandaj eksportsancoj en la eŭropa komuna merkato, de d-ro F. W. C. Blom.

"Precipe Germanujo havas grandan eksportavantaĝon de lingva regiono ĝis ekster la propraj limoj. La komerco inter okcidenta Germanujo, Aŭstrujo kaj Svislando grandigas hodiaŭ tre rapide. Ne ĝenas, ke la du lastaj landoj ne apartenas al la eŭropa komuna merkato. La doganremparoj montriĝas malgravaj kompare al la avantaĝo de komuna lingvo. La komuna lingvo same favoras la francan komercon kun norda Afriko kaj la komercon inter Britujo kaj la multaj angle parolantaj regionoj. La problemo de la lingva ligo ludas pligravigantan rolon. Tiu fakto, subtaksita de multaj, povas mirigi. La kaŭzo estas, ke ĉe la nuna akra konkurenco oni relative multe devas peni por vendi siajn artiklojn. Vendopeno en fremda lingvo estas duoble multekosta, ĉar oni devas havi dulingvajn vendistaron kaj reklamilojn.

Unu el la ie en Eŭropo fonditaj usonaj fabrikoj kalkulis, ke ĝia eksporto al landoj kun alia lingvo, nur pro la lingvaj komplikajoj, kiuj i.a. postulas, ke ĉiu teknikulo havu interpretiston, estas 18%-e pli multekosta ol la vendado en la lando de la fabriko mem. Tiu faktoro estas multe pli grava ol la intereŭropaj limimpostoj, kiuj nun por ĝia artiklo estas nur 8%. Tiu doganbaraĵoj ĉiam malgrandiĝas, sed ne la lingvaj baraĵoj.

Tiu ekzemplo nur rilatas individuan kazon, sed ĝi bone ilustras la grandegan signifon, kiun povas havi la lingva baraĵo. Tion komence ege subtaksis la usonaj firmoj, kiuj establis sin en Eŭropo. Ili volis starigi centran vendorganizaĵon kaj metis grandajn anoncojn por serĉi vendogvidontojn, kiuj flue parolas france, germane, angle kaj prefere ankaŭ itale, kiuj konas la strukturon de la merkato en ĉiuj eŭropaj landoj kaj kiuj krom tio estas ankoraŭ spertaj kaj energiaj vendistoj! Ili serĉis neekzistantajn mirakulojn.

(daŭrigo sur p.11)

(daŭrigo de p.12)

kontaktoj kun cetera mondo, esperanto efektive kapablas kontentigi certaparte tiujn ĉi bezonojn. En Okcidento mem esperanto ne plenumas tiun ĉi rolon oni ne sentas ĝian bezonon utiligante aliajn rimedojn. Ĉu oni rajtas konkludi, ke laŭgrada malaperado de la izoliteco de Oriento kaj Okcidento flankenpuŝados esperanton? Mi timus tiel konkludi, tamen ŝajnas al mi ke konfirmas tiun opinion Jugoslavio, kie la movado, eĉ se ne stagnas, certe ne evoluas tiel dinamisme kiel antaŭ kelkaj jaroj. Ĉu la samo minacas al belege evoluanta movado en Bulgario kaj Pollando? Mi ne volas esti Kasandro; tial la fina konkludo koncernos tion, kion mi jam foje esprimis: necesas sciencaj esploroj pri la afero, por respondi, kiel likvidi la disproporcion en disvastiĝo de esperanto en Oriento kaj Okcidento; t.e. kiel malstagnigi la movadon en Okcidento kaj krome -- kiel preventi la supozeble baldaŭan ekstagnon de la movado en Oriento?

Se iu en scienca disertaĵo pruvos, ke ĉi supre mi balbutas absurdojn, mi saltos du metrojn supren pro ĝojo, alikaze mi timas, ke ni ĉiuj devos komenci verki versaĵojn, kiel mia amiko el Francio.
(el Pola Esperantisto) Roman Dobrzyński

#####

(daŭrigo de p.10)

Nur poste tiuj usonaj firmoj malkovris, ke necesas kalkuli kun la lingvaj realaĵoj. Pro tio multaj el ili koncentriĝis unue al la plej granda lingva regiono, la germane parolanta."

Kiom da superfluaĵoj en mondo sen Esperanto! Kiom da malavantaĝoj precipe por malgrandaj lingvaj grupoj en mondo sen Esperanto!

(el Dia Regno)

W. Krikke

#####

LACAJ BATALANTOJ

En Italio diris al mi tre inteligenta homo, (kiajn oni ĝenerale renkontas en tiu lando) ke ne plu li pledos por esperanto; ne estas senco trudi la ideon al absolute indiferenta mondo. Mia franca amiko, iam aktiva, nun okupiĝas pri esperanta versfarado; en tiu kampo li trovis pli konkretajn atingojn ol en la organiza laboro. Pluraj aktivuloj, kiujn mi renkontis ĉirkaŭveturante Eŭropon, ŝajne agadas pli pro sento de devo ol pro konscio je bonrezultoj. Eĉ Dovra Soleo, la plej obstina el la obstinuloj, malhisis velojn, kaj ne plu pledas por esperantista respubliko en Dovro. Por mi estis kompreneble, ke Dovra Soleo pli aŭ malpli frue devos rezigni de sia projekto, ĉar ĝi ne havis ekonomian bazon. Sed kial laciĝas la "regulaj" aŭ "moderaj" (por ne diri normalaj) esperantistoj el Okcidento? Antaŭ ol respondi mi aldonu kio plu lacigas ilin. Lacigas ilin samideanoj el Oriento. Mi vidis ĉe esperantistoj en Italio, Francio kaj precipe en Hispanujo amasojn da leteroj el Oriento. Se oni volus ilin respondi, oni devus establi privatan leteroficejon kun dungitaj leterrespondistoj. Se ĉio ĉi finiĝus je leteroj! Oni sendas petojn pri mono, libroj, ŝtofo, ĉemizoj... Hontige, sed tio ne sufiĉas, okazas ke dumnokte frapas pardon amiko de la amiko de la korespondamiko, ĉar ĝuste li ne havas monon por hotelo. Ni lasu ĉu tio estas deca por la "antoj", sed ni demandu, ĉu tio estas agrabla por la "atoj"? Ŝajnas ke ĝi estas eĉ tre agrabla, oni konas ja samideanan helpemon, kondiĉe, ke ĝi okazas unu-du sed ne centfoje. Do kial meza elokcidenta esperantisto devas plenumadi tro ofte la samideanajn komplezojn por la orientanoj?

Jen ni tuŝas la kernon de la afero: ekzistas disproporcio en disvastigo de esperanto en Oriento, kie ĝi progresas kaj en Okcidento, kie ĝi stagnas. Kaŭzoj? Miaopinie sufiĉe klaraj: en Oriento, izolita dum pluraj jaroj, ekzistas granda bezono de
(daŭrigo sur p.11)

ANTAUVIDO

Grizrokoj senvivaj:
Suno pale luma:
Ventoj tre malvarmaj
Balaas teron, formante
La Mondon de Morto.

L'armeoj batalis
(Ne klopodis al ni
Nek zorgis ni pri kiu ajn
Fartus des pli bone.)
Nia apatio!

Maro movas ne plu:
Senĝoj sterilmarbord':
Nur mi, la ĉielon
Tute perditan al ĉiu
Staras rigardante.

Ja ne ĝenis al ni
Kiu eble gajnus,
Nek pri la mortigoj de si.
Do lasas ni mondon
Mortan bagatele.

Hejmo al la homar':
Jen kuris l'infanar':
Mondo de ĝojeco,
Malam', amo. Sed neniu
Restadas de tiuj.

Ĉiuj popoloj for;
Iri, mi scias ke
Ne longe devos mi
La sunsubiĝon atendi.
. Mondo de paceco!

Malamon ni pensis,
Amikecon timis.
Ni provis pene ŝanĝiĝi,
Sed ja tro malfrue.
Mondo de malamo.

Arthur Morse

#

ANONCETO

GRANDSKALA GAZETEKSPozICIO EN POLA URBETO ZAWIDOW: Nove fondita esperantista societo en la pola urbo Zawidow (ĉe la pola-ĉeĥa landlimo) planas aranĝi grandskalan ekspozicion de diverslingvaj gazetoj kaj turnas sin al gelegantoj en Usono kun arda peto sendi tralegitajn nacilingvajjn gazetojn al: Pola Esperanto-Asocio, Filio en Zawidow, str. Kopernika 7, Zawidow, Pow. Luban Sl, Pollando. Ĉiu donacinto de almenaŭ 5 diversaj revuoj ricevos re-kompence belan bildkarton.

AUSTRALIAJ STUDENTOJ APOGAS CIVILAJN
RAJTOJN POR INDIGENOJ

Kun vasta gazetara atento kaj subteno, civilrajta kampanjo komenciĝis en Aŭstralio en februaro kiam grupo de studentoj organizis "liberecan vojaĝon" por helpi al la indiĝenoj, la nigraj originaj enloĝantoj de Aŭstralio. La vojaĝantoj, studentoj el la universitato de Sydney, estis anoj de "Studenta Agado por Indiĝenoj" (SAFA). La originoj de SAFA estis firme ligitaj al la usona civilrajta movado, kaj eĉ ĝia ekzisto iagrade provokiĝis per tiu movado. La 6-an de majo, 1964, studentoj el la Universitato de Sydney organizis demonstracion ekster la usona konsulejo en Sydney por protesti pri rasa segregacio en Usono; la demonstracio fariĝis violenta, oni arestis 34 studentojn kaj ĵurnaloj tra la tuta mondo anoncis pri ĝi. Tamen, anstataŭ ricevi la senrezervajn dankojn de usonaj civilrajtaj grupoj, la aŭstralianoj trovis ke oni kritikis ilin: unu usona grupo aktiva pri civilaj rajtoj skribis al la ĵurnalo de la Universitato de Sydney por danki al la studentoj por ilia subteno, sed finis per demando kial la aŭstralianoj tiel interesigas pri usonaj problemoj kiam la aŭstraliaj indiĝenoj vivas en mizeraj kondiĉoj. Unu vorto al saĝuloj sufiĉis, kaj jam en junio 1964 grupo de studentoj kaj instruistoj komencis plani tion kio poste fariĝis SAFA. La nacia studenta unuiĝo de Aŭstralio, NUAUS, kaj ĉiuj studentaj politikaj kaj religiaj organizoj en la Universitato de Sydney subtenis la iniciaton.

Oni konsentis ke ne nur demonstracioj, sed ankaŭ studoj de indiĝenaj vivkondiĉoj kaj de la vidpunktoj pri raso ĉe blankuloj kaj indiĝenoj ricevos egalan pritrakton en la programo de SAFA. La nova grupo, sub prezidanto Charles Perkins kaj sekretario Jim Spigelman, forte rezistis ĉiujn klopodojn fare de tiu aŭ alia jam ekzistanta organizo transpreni kaj ekspluati la grupon, kaj la trideko de anoj restis firme dediĉitaj kaj sendependaj.

Sub gvido de Perkins, kiu estas mem parte indiĝeno (la sola kiu partoprenis la vojaĝon) kaj studento pri humanismaj studoj, la studentoj vojaĝis pli ol 3000 kilometrojn en norda New South Wales kun la celoj tiri la atenton de la publiko sur la indiĝenan problemon, kontraŭbati diskriminacion kie ili trovis ĝin, kaj vekti la intereson de

la indiĝenoj mem pri la movado. Dum la plej parto de la vojaĝo, la studentoj kolektis informojn pri indiĝenaj kaj blankulaj vidpunktoj pri diskriminacio kaj indiĝenaj vivkondiĉoj. Kelkfoje, tamen, ili rekte frontis diskriminacian politikon per la taktiko de paca demonstracio.

La 15-an de februaro la unuaj demonstracioj okazis en la urbo Walgett, kie la studentoj demonstraciis ĉe la klubo de la Veterana Ligo por protesti rasan diskriminacion. Aliloke en la urbo, du studentinoj klopodis aĉeti robon por indiĝena knabino por provi diskriminacion en magazeno (la vendistino ne permesis ke la knabino surmetu la robon). Tiun saman vesperon, la loka anglikana preĝejo petis al la studentoj ke ili ne tranoktu tie denove (kiel ili faris la antaŭan nokton) pro tio, laŭ Perkins, ke viroj kaj virinoj dormas en la sama ĉambro. La studentoj eniris sian aŭtobuson por ekiri al la venonta urbo, Moree. Kvin kilometrojn ekster la urbo, laŭ la raporto de la studentoj, kondukanto de kamiono klopodis puŝi ilin for de la vojo, malsukcesis, kaj klopodis denove -- la duan fojon, la aŭtobuso forlasis la vojon kaj preskaŭ renversiĝis.

La restado en Moree komenciĝis relative trankvile dum la studentoj okupiĝis pri sia enketo. Tamen, la duan tagon en la urbo, ili akompanis indiĝenajn infanojn al naĝejo kiu laŭdire estis fermita por indiĝenoj. Oni enlasis la infanojn kaj la instancoj insistis ke ne ekzistas politiko de diskriminacio rilate la naĝejon. Sed la infanoj diris ke neniam antaŭe oni enlasis ilin krom unu tagon semajne kiel parto de la lerneja sporta programo. Poste, la civitanoj de Moree grandskale voĉdonis por forigi malnovan leĝon kiu malpermesis eniron en la naĝejon al indiĝenoj. Kelkajn tagojn poste la studentoj, kiu intertempe daŭrigis sian vojaĝon, revenis al Moree, aŭdinte ke denove oni rifuzis eniron al indiĝenaj infanoj. Jam antaŭ 20 februaro perforto komenciĝis: kvincento da homoj ĉirkaŭis la protestantajn studentojn ĉe la naĝejo de Moree, huliganoj atakis la studentojn kaj aliajn homojn kiu subtenis la indiĝenojn, kaj kelkaj blankulinoj kraĉis kontraŭ la studentinoj el Sydney. Kvar lokaj enloĝantoj arestiĝis. Du oficuloj asertis ke ili malpermesis la naĝejon al la indiĝenoj

nur pro "higieno". Finfine oni atingis kompromison kaj oni konsentis nuligi la malpermesan leĝon kondiĉe ke la studentoj finos siajn demonstraciojn.

Kelkajn tagojn poste, la studentoj provokis plian tempeston per klopodo demonstracii ĉe kinejo en la urbeto Bowraville. Kiam ili alvenis, la posedanto fermis la kinejon. La kaŭzo de la disputo estis barilo kiu dividis la teatron en "blankajn" kaj "nigrajn" sekciojn: indiĝenoj, kiuj pagas malpli ol blankuloj, ne rajtas eniri la kinejon ĝis la lumoj estingiĝis. La posedanto diris ke li eĉ rifuzos al Perkins eniron en la blankan sekcion: "Se li havas indiĝenan sangon, nur unu lokon li rajtas, kaj tio estas kun la malheluloj". La postan tagon, la demonstraciantoj transiris al naĝejo en la urbo Kempsey. Sed ilia klopodo enirigi indiĝenojn malsukcesis - denove oni citis "higienon" kiel kialon - kvankam oni permesadis al indiĝenaj infanoj eniri kiam temis pri la lerneja sporta programo, sed nur tiam. Kaj ĉio ĉi spite de urba regulo kiu forigis diskriminacion en 1948.

Krom la esceptoj supre menciitaj, estis relative malmultaj skuaj incidentoj dum la vojaĝo. Perkins rimarkigis ke multaj blankuloj helpis ilin kaj ke ĝenerale la preĝejoj estis favoraj. Kvankam la vojaĝantaj studentoj venis, protestis kaj foriris antaŭ ol eblis iniciati ian konkretan agadon (kaj pluraj indiĝenoj kritikis ilin ĉar ili foriris tiam kiam ili nenion atingis krom inciti la malamikecon de la lokaj blankuloj), ilia vojaĝo atingis sian ĉefan celon: malkovri la vundon de rasa diskriminacio por ke ĉiu vidu ĝin. La gazetaro preskaŭ unuanime konsentis ke la Registaro ne rajtas eviti sian respondecon helpi al ĝia kuraco. Ĉefartikoloj pri la vojaĝo postulis registaran agadon pri egalaj salajroj kaj pli bonaj loĝejoj kaj lernejoj - eĉ en tiuj ĵurnaloj kiuj kontraŭstaris la liberecan vojaĝon en si mem. La konservativa Sun-Herald, de Sydney, en ĉefartikolo resumis la kontribuon de la studentoj: "Se ĉi tiu prilumo de komplika socia problemo maltrankviligos la publikan konscion kaj igos la Registaron plirapidigi kaj vastigi sian agadon inter la indiĝenoj, la studentoj rajtos la dankojn de ni ĉiuj".

(tradukita de H.T. el News Features, New York)

KONGRESETO EN OKCIDENTA MASSACHUSETTS

La dekan de aprilo la Bostonaj esperantistoj iris al kongreseto en Okcidenta Massachusetts. Je la unua ni renkontis en "Harvarda Placo" kaj ekiris al Millers Falls, cent mejlojn for. Du automobiloj kun sep personoj veturis kaj, kun escepto de miskompreno pri manĝohoro, la vojaĝo estis agrabla.

Frue post nia alveno ĉe Arthur Morse, sekretario de la gastiganta klubo, la Esperanto-Klubo de Pioneer Valley, la renkonto komenciĝis. Geesperantistoj de Millers Falls, Turners Falls, Springfield, Orange kaj ni de Boston, manĝis kaj amuziĝis ĉe Arturo.

Sinjoro Gould, estrarano de ilia Esperanta Klubo, invitis nin al sia infana Esperanta klaso. Post mallonga vojaĝo al Orange, ni ĉeestis la klason ĉe Sinjorino Dubour kaj estis agrable surprizitaj vidi la entuziasmon de la multaj junaj infanoj de la klaso. Post la klaso Sinjorino Wesson, kun kelkaj infanoj de sia klaso, alvenis el Phillipston. Tiam, komenciĝis la kanta festo. La infanoj estis ravitaj aŭskulti kaj kanti la multajn Esperantajn kantojn.

La plej proksiman tagon je la deka ni rekunvenis ĉe Sinjorino Allen. Ni havis mallongan aferkunsidon kaj poste manĝis bongustan tagmanĝon, parolante ĉiam Esperanton - kompreneble. Ni promenadis kaj poste devis prepari por la foriro.

La semajnfino estis tiel ĝuoplena kaj profitdona por ĉiu ke mi scias ke la afero ripetigōs tre baldaŭ.

John Shapiro

#

SCIENCO PER ESPERANTO:

La adiaŭo de "Scienca kaj Teknika Rondo". . .
. . . kaj la naskiĝo de "KEMIO Internacia"

Antaŭ 2 jaroj, konstatinte la mankon de E-a scienca literaturo, kaj en la deziro helpi la enkondukon de Esperanto en sciencojn kaj teknikon, oni fondis la "Scienca kaj Teknika Rondo"-n de GRAJNOJ EN VENTO.

Ekde tiam, aperis 4 numeroj de la Rondo. Per ili, oni publikigis 38 verkaĵojn venintajn el 13 landoj.

Tamen, ĝi ne estis la bezonata solvo. Ĝi tre utilis kiel unua paŝo, kiel unua sperto, sed ĝi ne sufiĉas ne ni deziros plene montri la valoron de Esperanto. Tial, ni decidis supreniri plian ŝtupon.

Kiel oni scias, scienca revuo pritraktanta ĉiujn fakojn, en la nuna momento kiam specialiĝo pli kaj pli disigas ĉiujn branĉojn de la homaj konoj, estas nereala solvo. Sed samtempe, ni ne povas pretendi la eldonadon de revuoj pri ĉiu fako kaj subfako. Ni devas adopti kompromisan solvon. Kun tiu celo, kaj laŭ la spertoj akiritaj per la "Scienca kaj Teknika Rondo" de GeV, Urugvaja E-Societo decidis entrepreni la eldonadon de "KEMIO Internacia", E-a revuo pri kemio kaj rilataj fakoj (biokemio, elektrokemio, geokemio, industria kemio, k. s.).

La eldonado de ĉi tiu nova revuo ne havos profitan celon. Ni deziras, ke ĝi estu distribuata kiel eble plej multe ĉe fakaj ne-Esperantistaj medioj; pri ĉi tio, ni parolos pli sube.

Unue, jen kelkaj detaloj pri la revuo mem.

En ĝi, ni publikigos nur prifakajn sciencajn verkaĵojn, rezultatojn de esploroj, novaĵojn pri atingiĝoj el esploro kaj tekniko. Ĝi ne estos vulgarigscienca revuo, ĉar nia celo ne estas popularigi sciencojn sed popularigi E-on inter sciencistoj. Ni prizorgos, por ke ĝia enhavo estu kiel eble plej altkvalita; ni prizorgos bonan prezentadon; ĝi estos presita revuo. La formato: 23 x 17 cm; por la jaro 1965, ni planis la aperigon de 2 numeroj, ĉiu el ili ĉ 80-paĝa. Ni prizorgos, por ke la revuo konformiĝu kun ĉiuj detaloj postulataj por tiaj publikaĵoj. La resumoj de la verkaĵoj publikigitaj aperos ĉe la plej gravaj internaciaj resumigaj revuoj. La biblioteknika aspektoj estos aranĝataj sub gvido de profesia bibliotekisto.

Kompreneble, ĉi tiu entrepreno ne daŭre sukcesos sen la kunlaboro de la esperantistaro. Ĉi sube, ni donas sugestojn, por ke la diversaj koncernaj instacoj, resp. individuoj, studu la eblecon konkretigi sian bezonatan helpon.

1. Distribuo de la revuo. Unu el la plej gravaj celoj de la revuo estas, ke ĝi estu distribuata ĉe Fakultatoj, Esplorcentroj, Altlernejoj, fakaj bibliotekoj, k.s. En la komenco, ĉi tiun taskon povus plenumi la lokaj E-Societoj. Ni sugestas, ke ili abonigu tiajn Institutojn en iliaj lokoj, aŭ abonu por tiaj. Estas nepre necese, ke ni alkitimigu la fakulojn al E-faka literaturo. La revuo ne celos propagandi E-on ĉe fakuloj, ĉar ni supozas tiun etapon superita. Ni rekte entreprenas la sekvantan etapon, tio estas, la praktikan, faktan uzadon de la lingvo. Ni montru per bone prezentita revuo, altkvalita, riĉenhava, vere fakscienca, ke Esperanto ne estas nur projekto, sed vivanta kaj tre utila fakto.

(daŭrigo sur p.27)

KLEMENTIN'
(Clementine)

En kaverno en kanjono
Laborante je la min',
Estis patro, vere mastro,
De filino Klementin'.
Mia kara, mia kara,
Mia kara, Klementin',
Vi perdiĝis nun ĉiame,
Bedaŭrinde Klementin'.

Elefante tre gracia
Delikata pezulin'.
Pakaĵkesto, taŭga vesto
Por pied' de Klementin'.

Anasidojn al la akvo,
Ŝi kondukis laŭ rutin',
Falis glite kaj subite
Subakviĝis Klementin'.

Le vezikoj el la buŝo
Bobelsone tiris sin.
Mi kuraĝas, sed ne naĝas,
Tiel dronis Klementin'.

Ŝia patro velkis tage
Ĉar li tiel perdis ŝin.
Li deziris kaj li iris
Esti apud Klementin'.

En la songoj ŝi aspektas
Tre ampleksa marvirin'.
Faras geston, kissugeston
Sed "Ne dankon, Klementin'".

Al mi mankis dolorige
Al mi mankis Klementin',
Ŝin forgesas, mi konfesas
Pro la kisoj de fratin'.

Pri tragika la rakonto
Nun vi skoltoj aŭdu min:
Per artfarita respirigo
Ankoraŭ vivus Klementin'.

XX
SŬANI
(Swanee)

Sŭani, mi vin amas,
Tre vin amas,
Plej kara Sŭani:
Tutmondon donus mi
Por esti nun en

D - I - X' - I. Eĉ mi scias
Panjo min atendas
Ĝis mi venos
Apud la Sŭani;
Mi ne plu iros norde de l' land'
Post venos mi al Sŭani strand'.
Sŭani, Sŭani,
Mi revenos al vi Sŭani;
Panjo, Panjo,
Amon al vi en la hejm!

XX
PLENIGU VIAJN GLASOJN

(Come landlord fill the flowing bowl)
Plenigu viajn glasojn ĝis la vino superflua
Ĉar venu morgaŭ kio ajn, la nunon ni tre ĝu
Gajaj estas ĉiuj ni (trifoje)
Ĝis morgaŭ for la zorgoj.

Tutkore ni kuntostu al la ĝoj' de amikeco.
Se iu ĝin rifuzas li ne estas homa speco.

Al amo ankaŭ trinku, ĝi meritas la honoron
Eĉ se kun feliĉeco ĝi alportas la doloron.
XX

KION NI FARU AL EBRIULO?
(what shall we do with a drunken sailor?)

1.Kion ni faru al ebrulo
Kion ni faru al ebrulo
Kion ni faru al ebrulo
Frue en mateno.

Hura ŝi nun leviĝas(trifoje)
Frue en mateno.

2.Metu ŝalupen ĝis resobriĝo
Frue en mateno. (trifoje)

Hura ŝi nun k.t.p.

3.Truon malŝtopu.Lin malsekigu(3)
Frue en mateno.

Hura ŝi nun k.t.p.

4.Tiru lin alten per forta ŝnuro(3)
Frue en mateno.

Hura ŝi nun k.t.p.

~~SHENANDOAH~~
SHENANDOAH

1.Ho Shenandoah,mi vin aŭskultus
Rekantaĵo:Fluadu for rivero.
Ho Shenandoah mi vin aŭskultus.
Rekantaĵo:Mi devas iri for
Sur river' Missouri.

2.Filidon vian mi ja amas
Filidon vian mi ja amas.

3.Mi ne ŝin vidis dum sep jaroj
Mi ne ŝin vidis dum sep jaroj.

4.Ho Shenandoah mi havas planon
Ŝipiri trans la oceanon.

5.Ho Shenandoah mi ne mensogas
Ho Shenandoah la mar' allogas

MARISTON LOGAS VASTA MAR'

Mariston logas vasta mar',
Ondaro kaj muĝ'.
La ŝipon skuas la ŝtormar',
Ne estas rifuĝ'.

Nun ĝis revid',belega knabin':
Revidos vi baldaŭ min.

Knabino mi diras "ĝis",
Ĉe ondo kaj muĝ'.
Min ligas ŝia lasta kis',
Jen estas rifuĝ'.

Nun ĝis k.t.p.
Ŝi flustras dolĉe en orel',
Ĉe ondo kaj muĝ!
Revenu baldaŭ via vel'

Al hejma rifuĝ!
Nun ĝis k.t.p.

~~INSULO KAPRI~~

INSULO KAPRI
(Isle of Capri)

Sur la insulo Kapri mi esploris,
Kaj en la ombro de arb' sidis ŝi.
Ho kiel bele la floroj odoris
Dum somer' en insulo Kapri.

Plej dolĉa ŝi kiel roz' en mateno
Ne destinita de sorto por mi.
Mi forveturis sed malgraŭ la penco
Tenas koron insulo Kapri.

Tien iris mi vojaĝe
Al Itala suna flam'

Tamen petis mi kuraĝe
Diru nur vorteton pri am'.

Vi ne plu restu ŝi saĝe konsilis
Kaj sian manon etendis al mi
Edzina ringo sur ĝi ore brilis

Do adiaŭ insulo Kapri.

~~INSULO KAPRI~~

(daŭrigo de p.18)

2. Redaktado de la revuo. La revuo estos eldonata sub la respondeco de la eks-Rondgvidanto de la "Scienca kaj Teknika Rondo", profesia kemiisto. La kvalito de la publikigitaj verkaĵoj estos garantiata per la kunlaborado de diversnaciaj sciencistoj kaj teknikistoj, apartenantaj al mondekonataj unuarangaj fakaj institutoj. Ĉiuj esperantistoj pretaj kunlabori en la plua disvolvado de ĉi tiu revuo, estas petataj nepre komunikiĝi kun ni al la suba adreso.

3. Prezo de la revuo. Por ĉi tiuj 2 numeroj aperontaj ĉi jare ni fiksas la prezon de 1 usona dolaro, aŭ egalvaloro, pageblaj al UEA, aŭ rekte al la adreso sube indikita. Ni petas, laŭeble, antaŭmendi la necesajn ekzemplerojn. Pograndaĵoj antaŭmendoj ricevos interkonsentitajn rabatojn.

4. Financado de la revuo. Urugvaj^aE-Societo prenis sur sin, la respondecon financi eventualan deficiton en la eldonado de la du 1965-numeroj. Ni sendis cirkulerojn al diversaj internaciaj pri-kemiaj kaj/aŭ priteknicaj kompanioj, petantaj ilin mendi reklam-anoncojn pri siaj produktaĵoj. Ni petas al ĉiuj personoj kun ebleco kontakti iamaniere tiajn kompaniojn, komunikiĝi kun ni (i.a. ges-amideanoj el Usono). Ni konsideros specialajn avantaĝojn (inter-konsentotajn) kun tiaj kunlaborantoj.

Eventuala superavito de ĉi tiu entrepreno estos uzata por: plibonigi la revuon; aperigi ĝin pli ofte; publikigi faksciencajn librojn.

Ĉiujn korespondaĵojn rilatantaj al la revuo, sendu al:

KEMIO Internacia, Casilla de Correo 1040, Montevideo,

URUGVAJO.

Abonkotizojn, sendu rekte al UEA, aŭ al jena adreso:

Alberto Barrocas, Yaguari 2248, Ap. 3, Montevideo, URUGVAJO.

#

ALDONAJ INFORMOJ PRI LA SCIENCA KAJ TEKNIKA RONDO de "GRAJNOJ EN VENTO":

La kvara numero de la Rondo eldoniĝis sub auspicioj de la jenaj institucioj:

Fakultato de Kemio, Universitato de Montevideo, Urugvajo

Instituto de Mineralogio kaj Geologio, Universitato de Leiden,
Nederlando.

Instituto de Mikrokemiaj Esploroj, Universitato de Litoral,
Argentino

Fakultato de Agrikulturo, Universitato de Kagawa, Japanio.
Atomkerna Studcentro de Grenoble, Nacia Komisiono por Atomenergio,
Francio.
Lernejo de Geologio de Pernambuco, Universitato de Recife, Brazilo.
Botanika Instituto kaj Geologia Instituto, Scienca Universitato,
Szeged, Hungario.
Biokemia Instituto, Medicina Universitato, Szeged, Hungario.
Naturescienca Fakultato, Karola Universitato, Praha, Ĉeĥoslovakio.

Ĝia enhavo konsistis el la jenaj artikoloj kaj studoj:

- "Kvanta Mezuro de gasoj el nuklefendiĝo per spektometrio" - M.
Blondel, A. Schürenkämper, A. M. Tachis, (Francio)
"Meteora uralitigo" - Jorge Bossi, (Urugvajo)
"Ĉu la relativekteorio estas revizienda?" - Wolfgang Ehrenberg,
(Germanio)
"Dezertaj fenomenoj en la valo de la rivero Sao Francisco" -
J. M. Mabesoone, (Brazilo)
"Surpapera elektroforezo de tre malgrandaj kvantoj de ocitocino" -
J. A. Coch, J. Brovotto, H. M. Cabot, C. Fielitz (Urugvajo).
"Malgrandaj ĉapitroj el la hipnologia laboro" - Teodoro Rosinsky -
(Ĉeĥoslovakio)
"Fantomoj de la suna sistemo" - Patrick Moore, (Britujo)
"Sekiĝo kaj rehidracio de peza prikultivata argiltero" - G. F.
Makkink, H. D. J. van Heemst, (Nederlando)
"Akiro de duonkemia paperpasto el ligno de "Acacia Mollissima" -
C. Michelotti, H. G. Wirth, (Urugvajo)
"La mikroelementoj el la nutrado de la brutaro" - Faustino F.
Beltran, (Argentino)
"Naturaj, akiritaj, kaj stimolitaj imunologiaj respondoj de la
Hundo al 'Echinococcus granulosus'" - M. A. Gemmel, (Nov-Zelando)
"Paleogeografio kaj paleobiologio de la ĉirkaŭaĵo de Budapeŝt en
supra eoceno kaj malsupra oligoceno" - Endre Dudi. h jr, (Hungario)
"Japanaj mangaĵoj de nutrokemia vidpunkto" - Sin-itiro Kawamura
(Japanio)
"Tuboj por mezuri premojn de fluaĵ medioj" - E. Schiltknecht Ingenieur
SIA, (Svislando)
"Beta-galktozidasaj ŝanĝoj en la disvolviĝanta intesta spaco de la
rato" - Anibal Alvarez, Jose Zas, (Urugvajo)

KOLONIISMO KAJ KRISTANISMO

Kiam en la du lastaj jardekoj nombro de Afrikaj estintaj kolonioj iĝis sendependaj ŝtatoj, multaj Okcident-Eŭropanoj miris pro la fortaj ribelaj sentoj kaj eĉ eksplodoj kontraŭ la blankuloj kaj ankaŭ pro la tuj sekvintaj internaj bataloj inter-civitanaj. Tiuj okcident-Eŭropanoj ignoris kelkajn faktojn. La nigrulo-mizerulo-primitivulo pensis ke politika sendependeco tuj alportos por li pliboniĝon multrilatan. Iom en la samspeca pensordo troviĝas la blanka "plenrajta" civilizita burĝo kiu estas ano de iu politika partio, kaj do voĉdonas por ĝi dum la reelektado, kaj kiu pensas ke la venko de lia partio alportos ankaŭ la ĉielon sur tero. (Tiu iluzio daŭras nur kelkajn tagojn; sed, strange, reaperas en la koncerna persono kiam ree alproksimiĝas la tempo de la reelektado!). La nigrulo vidis blankulojn; kaj tiuj blankuloj estis la mastroj. Do pereu tiuj blankaj mastroj. Rilate la duan fenomenon, la Okcidentanoj ne (sufiĉe) pripensas ke la gvidantoj de tiuj Afrikaj revoluciuloj estas tre ambiciaj tipoj, preskaŭ ĉiam diktatoremaj, kaj plej ofte inter si diferencaj rilate al politikaj kaj aliaj konceptoj. Estas ĉiam kaj ĉiam tiaj individuoj kiuj gvidas homamason. (Eble tamen ekzistas tre raraj esceptoj). Do, kiam la malamiko estas venkita, ili inter si komencas batali. Sed ne temas nun pri tiu fenomeno.

Multaj Kristanoj (kaj ankaŭ ne-Kristanoj) miregis ke tiuj malamikaj sentoj de koloniitoj manifestiĝis ankaŭ kaj tute ne mole, kontraŭ la Kristanaj misiistoj. Ili pensis ke devus resti ĉe la nigruloj nur sentoj de dankemo kontraŭ la misiistoj, kiuj ja tute ne volis profiti; kiuj alportis nur konsolon kaj helpojn materiajn kaj spiritajn. Efektive tio ŝajnas pli stranga kaj pli nekomprenebla. Ni mem konis multajn tiajn junulojn. Kaj efektive ili oferis vere ĉion por la nigrulo, kun eĉ ne la plej eta penso pri ia ajn profito. Tamen ili ankaŭ estis kaj estas persekutataj. Kiel klarigi tion?

Jam multajn jarojn antaŭ la dua mondmilito, Germana religiulo, Patro F. Stratmann o.p. montris klarege en sia majstroverko "Weltkirche und Weltfrieden" (Mondeklezio kaj mondopaco)

ke ekzistas neforigebla kontraŭeco inter blankuloj kiuj prediktas proksimumon kaj la samaj blankuloj kiuj militas kaj forrabas. Vi tuj kontraŭargumentos ke tiukaze la nigruloj ne sufiĉe faras distingojn. Ili efektive ne faras; cetere malfacile povas fari. Despli ĉar ne ĉiuj de la koloniistoj estis banditoj, dum ankaŭ ne ĉiuj de la misiistoj estis anĝeloj. Do, estas tute nature ke tiuj blankuloj, en la okuloj de la koloniistoj, aperas kiel unu tutaĵo. Signifoplena estis la deklaro tiurilate, dum la mondkongreso de la Bramanoj kaj Aziaj Budistoj en Chicago al la adreso de la Kristanoj: "Vi sendas al ni viajn misiistojn por ke ili prediku al ni pri via religio. Ni ne neas la valoron de via religio. Sed post kiam ni dum du jarcentoj lernis vin koni, ni vidas ke via tuta vivo estas en kontraŭdiro kun via religio kaj ke ne estas la spirito de vero kaj de amo kiu gvidas vin, sed jes la spirito de perforto kaj de profitemo...Tial vi neniukaze antaŭas nin, kaj tial vi devas lasi nin trankvilaj".

Rilate la postmilitajn okazintaĵojn el la Afrikaj landoj, ni legas tre atentindan raporton en la Nederlanda revuo "Sjaloom", revuo de kunlaborantaj Protestantoj kaj Katolikoj, sub gvidado de la fama Patro Jelsma (adreso: Burgstraat 46, Gent). En la numero de majo '64 ni legas ke okazis pasintan jaron en Nairobi en Kenio la Tut-Afrika Kristana Junulara Kongreso. Tie oni eksciis ke en la tuta kontinento la enloĝantoj opinias ke ne estas diferenco inter blankulo kaj misiisto. Kiam misiistoj mem ne ĉiam povis distingi inter okcidenta kulturo kaj Kristanismo, ĉu mirigi ke la nigruloj ne kapablis distingi?! Okazis kelkfoje ke la predikoj, ĉu konscie nekonscie, helpis al la fiksado de politika povo de la blankuloj. La ministro de edukado de Liberio, D-ro John Paynes Mitchell citis diron kiu estas, laŭ li, konata al ĉiu Afrika knabo: Kiam la blankuloj venis, ili posedis la Biblion kaj ni la teron. Nun ni posedas la Biblion kaj ili la teron. Li plie argumentis ke la eklezio havis tro da ligiloj kun la koloniismo. Dr. Mitchell konsentis ke la misiistoj donis instruadon; sed preskaŭ ĉiam senefikan. Efektive la

(daŭrigo sur p. 43)

(daŭriĝo de p. 7)

- Paŭlon el Tarso, kies opiniojn kaj vidpunktojn rilate la fraŭlecon ĉiu ano devas respekti.
3. La unuiĝo strebas kunloĝigi la anojn, por krei regnon de plena libereco, frateco kaj honesteco. Por la regnejon oni proponas la insulgrupon Galapagos.
 4. La unuiĝo celas plifortigi la moralecon de la mondo, montrante al la homaro imitindan ekzemplon.
 5. La nombro de tudefuloj estas limigita, se ĝi atingos pli ol 50% de nombro de ĝuste vivantaj viroj, la unuiĝo estas likvidata por konservi la homaran genton.
 6. Tudefulo devas konsideri la amon kiel psikan malsanon de la animo.
 7. La rilato de tudefulo al fraŭlinoj devas esti honesta, ĝentila kaj favora.
 8. Ĉiuj tudefuloj kaj ankaŭ personoj oficiale troviĝantaj sub la protekto de la unuiĝo devas senescepte parole regi la internacian lingvon "Esperanto" kiu estas agnoskata kiel ununura interkomprenilo dum la kontaktoj inter la anaro.
 9. Oni rekomendas ke tudefuloj atingu la unuan ŝtupon de edukado de hindaj jagoj por imuniĝi kontraŭ anim-malsano.
 10. Tiu ĉi baza statuto de TUDEF estas netuŝebla. La enhavataj reguloj povas esti nur kompletigataj, kaj ili estas obeendaj por ĉiu ano.

L a h i m n o d e T u d e f

Per himno ni laŭdu, ke ĉiuj ekaŭdu la noblan kant'
La brustoj leviĝu, okuloj flamiĝu, ekpulsu sang'
Fondiĝis por savo de l'homa estaĵo eterna fraŭla rond'
Ĝoju la homar' admiru nin la tuta mond'
Ĝuu virton nobla tudeful'
Vin patronas Paŭlo la sanktul'
Sur Galapagos ĝis la mort' favoros vin la sort'
Idoj benos vin, ke vi rezigniĝis de l'edzin'.

#

* * * * *

* NIAJN SPECIALAJN DANKOJN . . .

* ni etendas al
* Jenny Bishop, kiu dum la pasintaj monatoj (ek
* de la pasinta aŭtuno, sola respondecis pri
multobligado de la JEN-Bulteno -- tasko
samtempe monotoneca kaj tre esenca. Jenny.
alvenis Usonon antaŭ du jaroj el Britujo, kiam
ŝia edzo, ankaŭ brito, ekstudis edukadon ĉe *
Harvard. Ili reiros al Britujo ĉi-somere, li *
por ekokupi esploran postenon en la Universitato *
de Hull, ŝi por instrui modernajn lingvojn en *
gimnazio. Jenny lernis Esperanton en kurso de la *
E-Klubo de Harvard.

* * * * *

#

LA VENONTA NUMERO DE LA JEN-BULTENO (julio-aŭgusto)
redaktiĝos en Okcidenta Massachusetts, sub redakto de
Arthur Morse (4 Central Street, Millers Falls, Mass.).
Arthur aparte petas ke oni AMASE SENDU AL LI TAUGAN
MATERIALON.

#

DEZIRAS KORESPONDI...

Medicinistino, precipe pri temoj kiuj rilatas al bestoj--
KAMELIA TONKOVA, Neŭrologia Kliniko, Medicina Fakultato,
Sofia, Bulgario.

Lernantino en pedagoga linceo, 17-jara; interesiĝas pri
ĉiuj temoj kaj speciale filmoj - TERESA PRZYBYLAK,
Tarnowskie Góry, ul. Opolska 26, Pollando.

JEN JEN!

La paco de la redaktora apartamento estis brue interrompita malfruvespere komence de aprilo - per telefonsonoro. Bele oleumite per iom pli ol kutime festa vespero, la Novjorkaj junaj geesperantistoj subite decidis telefoni al li de la apartamento de JIM MAY kaj DICK KOLLIN, kie ili festis - printempon? fraŭlecon? la dumilionan kolektivian subskribon al la peticio de UEA? vendredon? la fakton ke Dick Kollin renkontis la spiriton de Zamenhof ĉe Kvina Avenuo kaj 44-a Strato antaŭ kelkaj semajnoj? La okazon amasigi denove la plej aktualajn skandalojn el Novjorko via Redaktoro kompreneble ne neglektis. Parolante kun SILVERMAN, FINEBERG, CALVERT kaj tute bunta aro de aliaj, li eksciis:

1. ke la festa tradicio de JEN daŭras tra ĉiuj obstakloj
2. ke Jim trinkis pli ol Dick
3. ke ne estis Zamenhof sed Ĉiang-kaj-Ŝek.

Kaj, parenteze, denove gratulojn al la novgeedzoj inter la JEN-anoj!

Ankaŭ kun PERE JULIA la redaktoro lastatempe parolis telefone. Pere ankoraŭ studas en Rochester, ankoraŭ funkciigas siajn E-kursojn, kaj intencas pasigi la venontan someron ĉe la Alia Flanko de la Akvo, eble en Israelo.

Aliaj JEN-anoj ankaŭ pilgrimos al la sanktejoj de Eŭropo. ANN BODINE, JULIE CRANDALL kaj JEANNE HARRIS ĉiuj per diversaj vojoj iros al Britujo. Julie intencas labori en Londono, partopreni la Intensivan E-Kurson en Barlaston kaj viziti Francujon; Ann, laŭ nia niaj supozoj, antropologos.

TOM DAVIDSON informis min ke li komisiis al juna esperantistino prizorgi la arangojn por la JEN-kunvenoj en Portland, dum la venonta kongreso de ELNA. Ŝi estas:

Margaret Guttormson
12130 South West 69th Avenue
Portland, Oregon 97223

JEN JEN!

Tiu telefono de la redaktoro ankaŭ estis perilo antaŭ pluraj sabatoj de voko de la vicprezidanto de la Japana Esperantista Studento Asocio, MATAKI YUNOSUKE. Yunosuke vizitis Boston kun sia familio, dum vizito al la gepatroj, portempe loĝantaj Novjorke. Via redaktoro kaj Julie Crandall renkontiĝis kun li ĉe lia hotelo, kaj tie okazis lia unua esperanta konversacio kun ali-landanoj! Ni poste aŭdis ke ankaŭ en Novjorko Yunosuke estis en kontakto kun la junaj geesperantistoj. Li estas nun supozeble denove en Tokio, kie li studas en Tokia Universitato. Yunosuke kompreneble emfazis la fakton ke ĉiuj eksterlandanoj estos bonvenaj en Japanio dum la venonta somero - la somero de la unua Universala Kongreso de Esperanto en Japanio. Ĉu ankaŭ vi ceestos?

FRED kaj PAT SHELL, niaj aktivuloj ĉe Berkeley, pretas ĉion novan provi - kaj sukcesigi. Antaŭ kelkaj semajnoj, ekzemple, ili starigis tablon en taŭga loko en la universitato kaj kolektis subskribojn al la propono de UEA al UNO. La afero bone sukcesis ne nur pro la nombro da subskriboj, sed ankaŭ pro la intereso pri Esperanto kiun ĝi vekis.

Sed entute entuziasmo kaj intereso pri Esperanto neniel mankas en Usono nuntempe. Ni preferas ne esti tro optimistaj kiam tio superfluas, sed ni ne povas eviti la konstaton ke nuntempe Esperanto faras grandegajn antaŭenpaŝojn ĉi tie en Usono. LOIS SHAPIRO raportas tute mirindajn sukcesojn ĉe Esperanto Education Center, la organizo kiun JENanoj fondis antaŭ du-tri jaroj, kaj kiu nun burĝonas sub la lertaj manoj de Lois. Ŝi respondis al pli ol 11.000 (dekunu mil!) korespondpetoj dum la pasintaj ses monatoj, vendis multe pli ol cent "Kompletojn" kaj enregistris sepdek novajn lernantojn de la Koresponda Kurso de EEC (Adreso: Esperanto Education Center, Box 406, Cooper Station, New York., New York 10003.)

(daŭrigo sur p.41)

NOVAĴOJ EL EKSTERLANDO

FRANCUJO:

La sekcio en Francujo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo do la franca ekvivalento de JEN - denove aktiviĝis post kelkvara duondormado. La unua Sekretaria Informilo de la sekcio (kies nomo estas JEFO) aperis en januaro, kaj ĝi enhavas dek plenplenajn multobligitajn paĝojn pri la tagaltaga funkciado de la sekcio - listojn de adresoj, petojn, informojn ktp. Nova sekretariino de JEFO estas la ĉarma Jacqueline Chefd'Homme.

Inter la diversaj fakoj en JEFO, ni notas Lernejan Fakon, Korespondan Fakon, Studentan Fakon kaj Fakon pri eksteraj rilatoj. Ĉu ankaŭ JEN ne bezonas fakojn por prizorgi specifajn facetojn de nia poresperanta laboro?

JEFO planas renkontiĝojn en Grésillon (aprilo), Besançon (majo), Le Havre (dum la 57-a Franca Kongreso de Esperanto, junio) kaj Sudokcidenta Francujo (julio).

JUGOSLAVIO:

De la 6-a ĝis la 10-a de septembro okazos en la konferencejo, antaŭe kastelo, de Podvin, apud Ljubljana en Jugoslavio, unika kaj elstara evento en la historio de Esperanto inter la junularo. Temas pri: seminario pri lingvaj problemoj en internaciaj junularaj rilatoj. Tio en si mem ne estas speciale rimarkinda - sed ĉi tiu seminario ne estos Esperanta seminario kvankam organizos ĝin Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. La diskutoj okazos en tri laborlingvoj - la angla, la franca kaj Esperanto. Partoprenos, laŭ invito de TEJO, reprezentantoj de ĉefaj internaciaj junularaj organizoj. La celo de la seminario estas simple kunigi la internaciajn junularajn organizojn por komuna diskutado de grava problemo -- problemo kiun ili konstante spertas en la propra administrado, inter si, kaj inter la organizoj mem kaj ties membraroj. TEJO organizas la seminarion kiel kontribuon al la Jaro de Internacia Kunlaboro. Ĝi estas la logika organizanto de tia renkontiĝo ĉar ĝi estas la sola internacia junulara organizo kiu kiel ĉefa celo okupiĝas pri lingvaj demandoj.

(daŭrigo de p. 8)

Malfermita Letero

laboro de TEJO dĉependas, ĉu Esperanton praktikos ankoraŭ la venontaj generacioj aŭ ĉu la idealo, por kiu vi ofereme agis dum via tuta esperantista vivo, iom post iom pereos!

La estraro de TEJO decidis krei specialan membrokategorion por tiuj pli aĝaj esperantistoj, kiuj pretas esti veraj amikoj de la Esperanto-junularo kaj subteni la agadon de TEJO, kaj ĝi alvokas ĉiujn pli aĝajn ol 25jara fariĝi Patrona Membro de TEJO:

- * Patrona Membro A pagas poĵare 16 ned.gld. (64 stelojn) kaj ricevas a) la revuon "Kontakto" kaj b) materialojn pri la agado de TEJO.
- * Patrona Membro B pagas poĵare 5 ned.gld. (20 stelojn) kaj ricevas laŭ peto regule informojn pri la aktiveco de TEJO.

Ĉi-loke ni deziras ankaŭ memori al vi la Fondaĵon Junulara Gazeto (FJG) - oficiala fondaĵo de UEA, per kiu vi povas subteni speciale la revuon "Kontakto". Krom aliĝo kiel Patrona Membro vi do kompreneble ankaŭ povos kontribui al FJG.

La nomoj de ĉiuj Patronaj Membroj estos listigitaj en "La Juna Vivo", kaj donacoj al FJG estos - kiel ĝis nun - registritaj sub la oficialaj komunikoj de la CO de UEA.

Bonvolu ne forgesi, ke ĉiuj aktivuloj de TEJO laboras sub ofte ekstreme malfavoraj personaj cirkonstancoj, samtempe studante por sia estonta profesio kaj tamen uzante grandan parton de sia libertempo - se ne eĉ sian tutan! - por Esperanto. Ĉu do estas tro, se ni petas vin grandanime subteni la entuziasmon de la junularo? Per via aliĝo kiel Patrona Membro, per viaj donacoj al la Fondaĵo Junulara Gazeto, vi garantias rekte la pluekzistadon de tiu junulara energio favore al pliaj sukcesoj de la Internacia Lingvo!

(daŭrigo sur p. 41)

DISSE LIBRETTO ISE FOR DOSE IU LAICHE TU FOLLOW
DI SPICCHER UAIL ISE SPICCHE

DI TRI BERRESE

Uans appona taim uas tri berrese; mamma berre, pappa berre, e beibi berre. Live inne contri nire foresta. NAISE aus. No mugheggia. Uanne dei pappa, mamma, e beibi go bice, orie, a furgnette locche di doore.

Bai enne bai commese Goldilocchese. Sci garra nattighe tu du batte meiche troble. Sci puscie olle fudde daon di maute; no live cromme. Den sci gos appesterrese enne slipse iu olle beddse.

Leisi slobbe!

Bai enne bai commese omme di tri berrese, olle sonnebrone enne send inne scius. Dei garra no fudde; dei garra no beddse. En uara dei goine due tu Goldilocchese? Tro erre aute inne strit? Colle pulissemenne?

Fette cienze!

Dei uas italian berrese, enne dei slippe onna florre.

Goldilocchese stei derre tri uicase; itte aute ausenomme, en giuste bicosse dei esche erre tu meiche di beddse, sci sei "go tu elle," enne runne omme craine tu erre mamma, tellenerre uat sanimabicese di tri berrese uer.

Uatsiuse? -- Uara iu goine du? -- Go compleine sittiolle?

#

ANONCETO:

S-ro Jean Talazac, Ecole des Garçons, Chateaneuf (El Biar), Alger, Algérie petas Esperantajn gazetojn kaj legmaterialon por siaj gelernantoj.

MAZOWSZE

- Mazowsze? Kio tio estas?
- Se vi ankoraŭ ne scias, aŭ neniam vidis tiun grupon el Pollando, ja mankas al vi tre interesa sperto.
- Nu, sed tio ankoraŭ ne klarigas kio tio estas.
- Ĉu vi iam aŭdis pri danctrupo Moisejev el Rusujo?
- Jes, certe.
- Do, Mazowsze estas la pola ekvivalento.
- Jes, ja do ĝi devas esti bona.
- Ĉu bona? Nur aŭskultu.

Geedzoj, Tadeusz Sygietyński, fama muzikisto, kaj Mira Ziminska, egale fama aktorino kaj kostum-desegnisto, kiuj ĉiam ensorĉiĝis pri popularioj, melodioj, ritmoj, kaj komplikaj dancoj kaj kostumoj de siaj patrujo, volis konservi ilin. Ili do tri jarojn post la dua mondmilito, en 1948, fondis novan danctrupon. Tiu lokiĝis ĉe Karolin, grandega iama bieno, dudek mejlojn de Varsovio, en la distrikto, Mazowsze.

Unue, ili devis ek trovi geartistojn por la trupo. Ili do provludigis pli ol 5,000 geknabojn. Unue, kaŭze de la milito, multe el la junularo preskaŭ ne povis legi aŭ skribi. De la komenco la Sygietyński bone edukis la aron en generala edukado kaj studado, inkluzive historion kaj matematikon, kiel ankaŭ harmonion kaj baledon. Hodiaŭ la aro konsistas el 100 geartistoj. La aĝamo estas de 18 ĝis 25 jaroj.

La Mazowsze (elparolita "Mazofŝe") estas unika. Antaŭ ol iu danco aŭ kanto eniras la repertuaron, elektas tion la anoj mem. Sed, ne sufiĉas ke ili ŝatas la eron. Kiel unu el la artistoj rakontas, oni devas unue pruvi ke oni vere volas tion danci. Se oni ne bone lernas ĝin, aŭ pritraktas ĝin maldiligente, tuj la verko estas forprenita de li.

Ĉiu kostumo estas mankudrita en etaj kamparaj vilaĝoj kiel farita en antaŭaj epokoj. (Eĉ la ŝminkujoj estas manĉizitaj el ligno kun ĉiaj belaj desegnaĵoj sur ili.) Nur unu serio de kostumoj estis fabrike farita kaj tiuj speciale por la Nord-Amerika rondiro dum la pasinta jaro. Tial la kostumaro, pli ol

ordinare, treege multekostas. La verdecaj kostumoj ĝenerale ege pezas. Ekzemple en unu "numero" pri ĉasistoj kaj montarbanditoj, la dancistoj (artistoj) devas porti veran ledan pantalonon kaj botojn, ankaŭ manfaritaj, kiujn ili devas mem kunligi kiel la veraj kamparanoj tion faras. La dancistoj eĉ dancas kurbsultre ĉar tiel sin tenas la kamparanoj kaŭze de la peza lignaro kiun ili devas porti surdorse.


En la sama numero ili kune batas hakiletojn. Tiu kiu vidas tion neniam forgesos ĝin. De antaŭ la scenejo kiel tio brilas, kaj senspirigas la spektantaron! Sed, tio estas ja vere tre danĝera danco ĉar la hakiletoj estaj veraj kaj ne teatraj artifikaĵoj. Mi mem vidis la vundetojn kaj cikatrojn akiritajn en la "batal-kampo". Kiam mi demandis al ano kial la knaboj ne uzas nur versimilaĵojn, estis klarigite al mi ke la hakiletoj devas brili kaj tinti. Nur vera ŝtalo tiel faras. Enestas la repertuaro eĉ danco kiun nur du personoj realigas. Se unu el ili malsaniĝas, forstrekita estas tiu ero de la programo. Temas pri akurata plenumado - aŭ kolo rompiĝos aŭ almenaŭ la dorso.

Verdire, en unu senso, la Mazowsze estas pli gaja kaj leĝera ol la Moiseyev. La dancoj kaj la muziko kaj kantaroj estas okule kaj orele tre frapaj. Dank' al Sol Hurok, fama impresario kiu nun vidigas al Usono la Haledon Leningrad Kirov la Mazowsze jam dufoje aperis en Usono. Nun oni povas aŭdi la muzikon pere de diskoj eldonitaj de la diskfirmo MONITOR kiu specialistas pri popolmuziko. Mi povas tre forte rekomendi tiujn al vi ĉar ili estas tre gaje kaj arte prezentitaj.

Joseph I. Blitz



#

Misiisto perdita meze de la afrika ĝangalo subite troviĝas fronte-fronte al leono. Li ekfalias surgenu kaj krias:
"Sinjoro Eternulo! Inspiru kristanajn pensojn al ĉi tiu kompatinda besto!" Kaj li ekaŭdas la leonon kviete murmuri:
"Sinjoro Eternulo! Benu min kaj benu ĉi tiun nutraĵon, kiun vi per via favoro donacis por manĝo al mi..."
(Svisa Espero)



(daŭrigo de p. 5)

Kial tiu Seminario-Feriosemajno estas aparte vizilinda? Ĉar ĝi estas unu el la malmultaj esperantistaj renkontigoj (se ne la unika), kiu okazas en medio de pli ol mil samtempe feriumantaj gejunuloj diversnaciaj. Ĉu vere tio ne estas ideala laborkampo por nia informado; por esplori la lingvajn problemojn de la nuntempa junularo tiajn kiaj ili efektive estas; por enketi la opinion pri Esperanto de junuloj plej diversaj laŭ nacieco, klereco kaj socia pozicio; por pruvi la praktikan utilon de Esperanto kaj manifesti ĝian funkciadon ĉe la diskutado, ĉe la amuzado kaj . . . ĉe la amindumado.



(daŭrigo de p. 34)

Intertempe, ĉe la alia fino de Manhattan, BERNARD STOLLMAN, direktoro de Esperanto Information Center, la inform-centro de ELNA, produktis similajn rezultojn pri informpetoj. Tiom da informpetoj enfluis la oficejon de E.I.C. ke MARY MURRAY kaj la aliaj helpantoj ĉe E.I.C. parolas pri antaŭdiluva kaj post-diluva epokoj. Por ankoraŭfoje tordi la vortojn de MARK STARR, "La fluanta tajdo estas nun ĉe ni. Sed kie estas nia boato?"

En ĉiu ĉi aktivado, la membronombro de ELNA soras. Aktualajn ciferojn ni ne disponas, sed sendube la nunaj kreskoj reprezentas la plej signifan pligrandigon en la historio de la organizo.

De tempo al tempo atingas nin novaĵoj de nia ekzilito en Fora Turkio, JONATHAN POOL, kiu instruas la anglan lingvon kiel instruisto kun la Packorpuso. La laboro evidente estas peza kaj ne permesas al Jonathan multan liberan tempon, -- sed laŭ ĉiuj indikoj li modele plenumas siajn taskojn, samtempe gajnante ĝis maksimumo spertojn el la restado. Tutcerte nova Jonathan salutos nin en 1966 kiam li revenos. Pri Turkio kaj la turka lingvo skribis Jonathan - "Turkish is the second coolest language I know -- and the first is not English"...

#####

(daŭrigo de p. 36)

Estu certa, ke ni alte aprezas ĉiam ĉian kaj ĉies helpon!

Kun tre sincera antaŭdanko, multaj bondeziroj por via persona bonfarto kaj koraj salutoj, via

Estraro de TEJO -

Ivo Osibov, Simeon Simeonov, Humphrey Tonkin, D-ro Carlo Minnaja, Ulrich Lins, Marek Pietrzak, Yoshimi Umeda, Svobodan Zlatnar

(daŭrigo sur p.43)

L I B R A R Y
J E N

A Lending Library has been set up for the use of all JEN members:

The purposes of the library are to acquaint members with the international Esperanto press, and to provide material for members who want to perfect their command of the language by reading articles written in international style. This will be done by lending sets of four Esperanto magazines to members for periods of three weeks. Every member may borrow, one at a time, as many sets as he desires. All the magazines will be less than a year old, and care will be taken to see that no one receives the same set twice.

The library will also lend magazines or other Esperanto materials of special interest to members putting on displays or exhibitions.

Both of these services are free, except for the cost of postage. To borrow a set, simply send 10¢ in coin or unused U. S. stamps to the address below. The wrapper in which the magazines arrive can, if opened carefully, be used to return them in. The magazines you borrow may be keys of understanding that will open doors to your better knowledge and enjoyment of the wide, wide world of Esperanto. Write to the

JEN Lending Library
2475 Linden Avenue
Long Beach, California

Since the library operates with donated literature, please send any magazines for which you no longer have any use, that are in or about Esperanto, to the same address.

* * * * *

(daŭrigo de p. 30)

nigruloj tiamaniere estis edukitaj ĝis alia socia tavolo kie ili tamen ne estis akceptataj de la blankuloj. La ĵurnalisto James Ngugi el Kenio defendis la tezon ke la Kristanismo en Afriko estis integra parto de la koloniismo. Predikante suferemon je la malriĉeco kaj obeemon je la blankaj mastroj, la misiistoj iĝis esenca subparto de la kolonia sistemo. Jen sonis la voĉo de Kristanaj Afrikanoj. Mi kredas ke ni nun kapablas kompreni la tragedion kiu okazis kaj ankoraŭ okazas tie.

F. R.

(el Sonorilo)

#

(daŭrigo de p. 4)

Kiel pagi al TEJO

- * Al Universala Esperanto-Asocio
pere de a) poŝtĉekkonto 378964, b) Banko R. Mees en Zoonen,
Rotterdam
 - * Al landaj ĉefdelegitoj kaj perantoj de UEA
 - * Al la kasisto de TEJO, Ulrich Lins, 5 Köln-Dellbrück, Gemarken-
str. 146, Germanio (poŝtĉekkonto 138119 Köln)
 - * Al la estrarano de JEN pri eksterlandaj aferoj.
- Pagante bv. ĉiam aparte indiki la celon de via pago!

#